

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

41a jarkolekto, majo 2020/05



Malkovrita krustulo enhavas plaston

Kronvirusa distopio

**Neantaŭvidebla
ĉefministro en Slovakio**



Ĉu lingvo influas la melodion de kantoj?

Kiel pagi vian abonon de MONATO

V.20-04

▶ Rekte al la eldonejo ...

- ▶ Per via FEL-konto.
- ▶ El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- ▶ Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton tra nia sekura servilo: <https://www.esperanto.be/fel/mon/abonilo.php>.
- ▶ Per PayPal al financo@fel.esperanto.be.
- ▶ Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

▶ Tarifoj

Ŝtato de la paganto	surface	Monato			La Jaro aere	
		aere	ciferece	3a klaso	1a klaso	
Argentino	EUR	36	39	21,6	6,9	9,9
Aŭstralio	AUD	97	102	58,2	11	16
Aŭstrio	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Belgio	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Bosnio-Herc.	EUR	36	39	21,6	6,9	9,9
Brazilo	EUR	36	39	21,6	6,9	9,9
Britio	GBP	54	57	32,4	6,2	8,9
Bulgario	EUR	36	39	21,6	6,9	9,9
Ĉeĥio	EUR	50	53	30	6,9	9,9
Ĉinio	EUR	36	39	21,6	6,9	9,9
Danio	DKK	440	465	264	51	74
Estonio	EUR	41	44	24,6	6,9	9,9
Finnlando	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Francio	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Germanio	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Grekio	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Hispanio	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Hungario	HUF	13300	14280	7980	2300	3200
Irlando	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Islando	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Israelo	EUR	52	55	31,2	6,9	9,9
Italio	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	870	1270
Kanado	CAD	87	92	52,2	10	14
Kipro	EUR	50	53	30	6,9	9,9
Koreio	EUR	52	55	31,2	6,9	9,9
Kostariko	EUR	36	39	21,6	6,9	9,9
Kroatio	EUR	41	44	24,6	6,9	9,9
Latvio	EUR	41	44	24,6	6,9	9,9
Litovio	EUR	41	44	24,6	6,9	9,9
Luksemburgo	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Malto	EUR	50	53	30	6,9	9,9
Nederlando	EUR	59	62	35,4	6,9	9,9
Norvegio	NOK	590	620	354	70	99
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	12	18
Pollando	PLN	180	192	108	29	43
Portugalio	EUR	52	55	31,2	6,9	9,9
Rusio	EUR	36	39	21,6	6,9	9,9
Serbio	EUR	36	39	21,6	6,9	9,9
Slovakio	EUR	41	44	24,6	6,9	9,9
Slovenio	EUR	50	53	30	6,9	9,9
Sud-Afriko	EUR	52	55	31,2	6,9	9,9
Svedio	SEK	640	670	384	75	105
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

▶ aŭ pere de peranto ...

- ▶ **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pk. IBAN AT80 6000 0000 0712 7744. Rete: aon.913548977@aon.at.
- ▶ **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen (IBAN BE66 0000 2653 3843 BIC BPOTBEB1). Rete: financo@fel.esperanto.be.
- ▶ **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Rete: info@esperanto.ba.
- ▶ **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301/303, Brasília - DISTRITO FEDERAL, 70393-902. Rete: bel-abonserve@esperanto.org.br.
- ▶ **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Rete: eab@esperanto.org.uk.
- ▶ **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady III, tel. 723 672 335. Konto banko: Equa bank - 101 953 9617/6100. Rete: polnickypavel@seznam.cz.
- ▶ **Ĉina:** Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jingchuan-Xian Jingqiao Guoji, 744300 Pingliang, Ĉinio. Poŝtel.: +86 18893316800. Rete: trezoro@qq.com.
- ▶ **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv. DK-2100 København Oe. Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Rete: arnecasper@yahoo.com.
- ▶ **Estona:** Ahto Siimson, Kastani vk.12-11, Paikuse alev, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.
- ▶ **Finna:** Paula Niinikorpi, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15, C 65, 00530 Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.
- ▶ **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (IBAN FR76 4255 9000 0941 0200 1388 731 BIC CCOPFR-PP05X). Rete: esperanto-france@esperanto.org.
- ▶ **Germana:** Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Rete: wolfgang.schwanzler@esperanto.de.
- ▶ **Hispana:** Pedro A. Garrote Escribano, C/Las Mercedes, 5-5º-C, 47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@gmail.com.
- ▶ **Hungara:** HEA, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. II/209. Poŝtkest-adreso: HU-1368 Budapest, Pf. 193. Telefonnumeroj: 36/70/932-7465, 36/70/932-7464. Rete: hungario@gmail.com, www.esperantohea.hu.
- ▶ **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviersp@eircom.net.
- ▶ **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.
- ▶ **Israela:** Jehoŝua Tilleman, 97-A Dereh-Akko, IL-2637324 Kirjat Mockin. Rete: b48705544@013.net. Telephone: (04) 8 70 55 44.
- ▶ **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pk.: 37312204). Rete: feisegreteria@esperanto.it.
- ▶ **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzuku-ku, Tokio 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.
- ▶ **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Raymond Brisebois, kasisto, 414-110 Grand Ave. London, ON N6C 1L8. Rete: rjlba@yahoo.ca.
- ▶ **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08204 Sabadell. Rete: perado@esperanto.cat.
- ▶ **Korea:** Korea Esperanto-Asocio, Gangbyeon hansin core B/D, 1601 ho, 350 Mapo-dong Mapo-gu, Seoul 121-703. Rete: esperanto@saluton.net.
- ▶ **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250, Escazú. Rete: miaumiau@ice.co.cr.
- ▶ **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
- ▶ **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k. 178, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Rete: laimiuslt@gmail.com.
- ▶ **Luksemburga:** LEA, 2, om Kleaupchen, 5682 Dalheim (pk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Rete: brian.moon@gmx.com.
- ▶ **Norvega:** NEL, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo. Rete: oficejo@esperanto.no.
- ▶ **Nov-Zelanda:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, Nov-Zelando. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.
- ▶ **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XV O/Wwa. Rete: dankaleyk@gmail.com.
- ▶ **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio / Associação Portuguesa de Esperanto, Praceta Humberto Delgado, 1-B, Monte Abraão, PT-2745-318 Queluz SNT. Rete: portugala@esperanto.web.pt.
- ▶ **Ruslanda:** Halina Goreska, RU-236039 Kalinigrad, ab. ja. 1205, Ruslando. Rete: sezonoj@kanet.ru.
- ▶ **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, poŝtel. +381-63-7200 616. Rete: zciric2@gmail.com.
- ▶ **Slovaka:** Peter Baláz - ESPERO, Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio. Tel. +421 902203369, rete: petro@ikso.net.
- ▶ **Slovena:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
- ▶ **Sud-Afrika:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill, 3 Bower Road, Wynberg, 7800. Rete: cbeckford@telkomsa.net.
- ▶ **Sveda:** Sveda Esperanto-Federacio, c/o Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: svenska@esperantoforbundet.se.
- ▶ **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Rete: ch_scheidegger@bluwin.ch.
- ▶ **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Rete: elna@esperanto-usa.org.

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 41a jar-kolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande (vidu p. 2).

MONATO havas 126 korespondantojn kun kunlaborkontrakto en 43 landoj kaj abonantojn en 68 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; MONATO estas eldonata en tradicia papera versio kaj elektronike en la formoj PDF, ePub kaj Mobipocket; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de la eldonejo.

eldonejo:

Vlaamse Esperantobond v.z.w.
(Flandra Esperanto-Ligo),
Lange Beeldekenstraat 169,
B-2060 Antwerpen, Belgio;
telefono: + 32 3 234 34 00;
retpoŝto: eldonejo@monato.be;
Skype: fel-monato;
BE0419 028 122 -
RPR Antwerpen.

retejo: www.monato.be



sociaj retejoj:

Twitter: @FEL_Antverpeno
Facebook: facebook.com/
revuo.Monato/
Telegramo:
monato.telegramo.org

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

gvida redaktoro:

Paŭl Peeraerts.

reviziantoj:

Renato Corsetti, Edmund
Grimley Evans, Jens S. Larsen,
Rob Moerbeek, Brian Moon,
Manolo Parra, Andrej Pečėnkin,
Anna kaj Mati Pentus.

faktokontrolanto:

Andrė Ruysschaert

redakcia sekretario:

Paŭl Peeraerts.

Rete: redakcio@monato.be.

grafiko:

Zep Armentano, Ferriol Macip.

redaktoroj:

➤ **Arto:** Claude Nour-
mont-Moon, Luksemburgo,
arto@monato.be.

➤ **Ekonomio:** Roland Rotsaert,
Belgio, ekonomio@monato.be.

➤ **Eseoj:** Sendu al la koncerna
redaktoro, depende de la temo.

➤ **Historio:** Trevor Steele, Aŭs-
traliao, historio@monato.be.

➤ **Hobio:** Evgeni Georgiev,
Aŭstrio, hobio@monato.be.

➤ **Komputado:** Edmund
Grimley Evans, Britio,
komputado@monato.be.

➤ **Leteroj:** Paŭl Peeraerts,
Belgio, leteroj@monato.be.

➤ **Libroj:** Boris Kolker, Usono,
libroj@monato.be.

Noto: Librecozojn oni ne
sendu al la redaktoro propra-
riniciate. La kunlaborantoj
ricevos la recenzopetojn kaj la
librojn de la eldonejo.

➤ **Lingvo:** Roberto Pigro,
Kipro, lingvo@monato.be.

➤ **Literaturo:** Trevor Steele,
Aŭstria, literaturo@monato.be.

➤ **Medio:** Sendu viajn kontri-
buojn al medio@monato.be.

➤ **Moderna vivo:** Norberto
Díaz Guevara, Kubo,
moderna_vivo@monato.be.

➤ **Politiko:** Alexander Schlafer,
Usono, politiko@monato.be.

➤ **Scienco:** Roberto Pigro,
Kipro, scienco@monato.be.

➤ **Spirita vivo:** Alberto Garcıa
Fumero, Kubo,
spirita_vivo@monato.be.

➤ **Turismo:** Evgeni Georgiev,
Aŭstrio, turismo@monato.be.



FOTO DE LA KOVRILLO: ZUZANA ĈAPUTOVÁ

En tiu ĉi numero

	politiko	
	SLOVAKIO	5
	➤ Neantaŭvidebla sed poreŭropa ĉefministro	
	SVEDIO	7
	➤ Demarŝo kontraŭ enmigro	
	moderna vivo	
	JAPANIO	9
	➤ Longvivado, ĉu beno aŭ sufero?	
	SOCIO	10
	➤ Virinoj: kontraŭ militoj kaj torturoj	
	KUBO	11
	➤ Konsultlibro por hispanlingvanoj	
	TRAFIKO	12
	➤ Rektaj trajnoj inter Vieno kaj Bruselo	
	historio	
	ANTAŬ 40 JAROJ	13
	➤ Dek monatojn aĝa bebo gajnis juran batalon	
	lingvo	
	AKTUALE	15
	➤ Virusa konfuzo	
	OPINIO	16
	➤ Ĉu lingvo influas la melodion de kantoj?	
	scienco	
	ZOOLOGIO	18
	➤ Krustulo malkovrita (p)lastatempe	
	eseo	
	PANDEMIO	19
	➤ Kronvira distopio	
	EKOLOGIA POLITIKO	21
	➤ Kie restas la verduloj?	
	libroj	
	➤ Resonanta kaj labirinta poetino dulingva	23
	➤ Provo detruu la mitojn	25
	Abonoj	2
	Monato sin prezentas	4
	Antaŭ 40 jaroj	22



Claude Nourmont

(redaktoro de la rubriko „Arto”, Dalheim, Luksemburgo)

Ekde mia infaneco mi aŭdis pri Esperanto, tamen ne tuj lernis ĝin. Estis strato Zamenhof en la urbo, kie mi loĝis, kaj dum promenoj mia patro ĉiam klarigis, kia homo estas tiu de la nomŝildo. Foje ni feris en hotelo, kie estis diversaj familioj. Iam iu

disdonis flugfolion pri sia urbo. Aldone al la franca estis resumo en iu lingvo, kaj oni provis divenigi al la infanoj, kiu ĝi estas. Post diversaj malĝustaj respondoj oni donis la solvon: Esperanto. Kaj tiam mia patro klarigis al mi, ke temas pri lingvo, kiun ĉiuj povas kompreni! La ideo ŝajnis al mi tiom mirinda, ke ĝi kvazaŭ gravuriĝis en mia menso. Tamen necesis ankoraŭ pluraj feliĉaj hazardoj, por ke mi fine lernu la lingvon.

Mi estas franca, edziniĝis al brito, Brian Moon, loĝas en Luksemburgo, kaj nun de pli ol 40 jaroj mi vivas en Esperantujo.

En la universitato mi sukcese studis plurajn fakojn, magistriĝis pri filozofio, licenciĝis pri psikologio kaj pri arthistorio.

Kiam ĉe Monato oni ekserĉis novan redaktoron pri la rubriko „arto” mi proponis min. Sed estas malfacila fako, ĉar ĝi estas vastega kaj kovras amason da temoj, kiujn mi apenaŭ konas. Dum la studoj mi specialiĝis i.a. pri mezepoka arto, kaj fakte por Monato temas multe pli pri aktualaj temoj ol historiecaj. Feliĉe, ke perretaj esploroj ebligas kleriĝon pri nekonataj temoj! ■

Brian Moon

(lingva revizianto, Dalheim, Luksemburgo)

Esperanton mi lernis 13-jara, do antaŭ preskaŭ sesdek jaroj. Ĝi rapide iĝis mia dua ĉiutaga lingvo, kaj tia ĝi plu estas ĝis nun. En mia nuna emerita vivo Esperanto havas verŝajne eĉ pli fortan ĉiutagan rolon.

Tiu mia adoleska sperto, ke mi sukcesas ekregi lingvon je alia nivelo ol la lerneje studataj franca kaj latina,

certe grave influis mian postan lingvolernadon kaj do mian tutan karieron de lingvisto, komence kiel lingvoinstruisto kaj poste dum pli ol 35 jaroj kiel tradukisto ĉe Eŭropa Komisiono, kie mi sinsekve proprigis al mi pliajn lingvojn laŭ la plivastiĝo de Eŭropa Unio (en sepdekaj jaroj la grekan, en naŭdekaj la finnan kaj laste la estonan).



Origine brito, aŭ pli precize sud-anglo, mi venis pro laboro al Luksemburgo, kie mi loĝas dum jam pli ol 40 jaroj. ■

SLOVAKIO

Neantaŭvidebla sed poreŭropa ĉefministro

ZUZANA ČAPUTOVÁ/TWITTER

La Prezidento de Slovakio, Zuzana Čaputová, salutas la novan ĉefministron, Igor Mitovič, dum la kronviroza krizo.



Julius HAUSER

korespondanto de MONATO en Slovakio

La 29an de februaro 2020 en Slovakio okazis tutlandaj parlamentaj elektoj. Ĉirkaŭ 25 politikaj partioj esperis akiri favoron de la publiko. Surbaze de la voĉoj eniris la novan slovakon parlamenton ses politikaj partioj. Kvinono de la parlamentanoj estas virinoj. En la elektoj partoprenis 65,8 % de la voĉdonrajtanoj; en la antaŭaj elektoj, en 2016, la partopreno estis 59,8 %.

Surprizo

En la elektoj neatendite venkis kun granda avantaĝo

la politika partio *Simplej Homoj kaj Sendependaj Personoj* (*Obyčajní ľudia a nezávislé osobnosti, OLANO*) estrata de Igor Matovič [mátovič]. Lin favoris tiuj, kiuj ne kredis la promesojn de la nuntempaj registaraj politikaj partioj. La partio rikoltis 25,02 % kaj akiris en la 150-membra parlamento 53 mandatojn.

Post publikiĝo de la elektaj rezultoj Matovič energie rifuzis krei novan koalician registaron kun la ĝis nun reganta maldekstra politika partio *Direkto – socialdemokratio* (*Smer – sociálna demokracia*). Ĉi tiu politika partio okupis la

”

Laŭ politikaj analizistoj, la falon de la reganta politika partio kaŭzis ĉefe korupteco de ĝiaj partiaj elitoj, „klientismo”, diversaj politikaj kialoj kaj ankaŭ parta konsento kun ekstremismaj opinioj

duan lokon kun 18,29 % de la voĉoj kaj 38 mandatoj.

La trian lokon okupis la politika partio *Ni estas Familio* (*Sme rodina*), kiu akiris 8,24 % kaj 17 mandatojn. Fine superis la sojlon de la slovak parlamenton ankaŭ la ekstrema *Popola Partio Nia Slovakio* (*Ludová strana Naše Slovensko*), kiu akiris 7,97 % de la voĉoj (17 mandatoj), kaj la liberala partio *Libereco kaj Solidareco* (*Sloboda a solidarita, SAS*) kun 6,22 % de la voĉoj (13 mandatoj). La plej malgranda partio en la parlamento nun estas la nova politika partio de la iama prezidento Andrej Kiska *Por Homoj*

(Za – ludi), kun 5,77 % kaj 12 mandatoj.

Malnovaj vizaĝoj

Laŭ politikaj analizistoj, la falon de la reganta politika partio *Direkto – socialdemokratio*, fondita en 1999, kaŭzis ĉefe korupteco de ĝiaj partiaj elitoj, „klientismo”, diversaj politikaj kialoj kaj ankaŭ parta konsento kun ekstremismaj opinioj. Krom tio, la partio proponis al la balotantoj nur malnovajn partiajn vizaĝojn kaj malnovajn elektajn sloganojn. La malvenko de la reganta partio havas amaretan guston precipe por ĝia prezidanto kaj eksĉefministro Robert Fico.

Historia malsukceso

La kvinelcentan minimumon por eniri la parlamenton ne atingis du regantaj partioj. *Slovaka Nacia Partio (Slovenská národná strana, SNS)* rikoltis nur 3,16 % de la voĉoj. La politika partio *Ponto (Most-Híd)*, kiu defendas precipe la interesojn de la hungara minoritato en Slovakio, akiris nur 2,05 %. Do, la hungara kaj aliaj minoritatoj en Slovakio ne havos rektan reprezentigon en la parlamento, la unuan fojon ekde 1990. La malsukceso en la elektoj igis plurajn prezidantojn de politikaj partioj rezigni siajn oficojn.

Neantaŭvidebla

Igor Matovič estas 46-jarulo. Li studis en la fakultato

”

Bonegaj scioj pri enlanda politiko, polurita retoriko kaj preteco reagi en ĉiuj diskutoj

pri administrado de la universitato Comenius en Bratislavo. Ekde 1997 Matovič laboris kiel memstara komercisto kaj en 2002 fondis la eldonejon *regionPRESS*, kiu eldonas 36 regionajn semajnaj gazetojn tra la tuta Slovakio. Ekde 2010 li estas membro de la slovak parlamento. En 2012 li fondis la politikan partion *Ordinaraĵoj Homoj kaj Sendependaj Personoj*.

Liaj grandaj avantaĝoj estas bonegaj scioj pri enlanda politiko, polurita retoriko kaj preteco reagi en ĉiuj diskutoj. Inter liaj malavantaĝoj nomeblas sensperteco pri eksterlanda politiko kaj okaza nekonvena kaj nekonforma konduto.

La novan registaron de Slovakio, kiun gvidos Igor Matovič, atendas multe da laboro: interalie, ordigo de la publikaj financoj, plibonigo de la infrastrukturo (precipe aŭtoŝoseoj), batalado kontraŭ koruptado ktp. La unua eksterlanda vizito de Matovič estos al Ĉeĥio. ■



La **Deklingva manlibro pri politiko** de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.

Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo,
Lange Beeldekensstraat 169,
B-2060 Antwerpen, Belgio;
butiko@fel.esperanto.be
aŭ www.retbutiko.be
kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

SVEDIO

Demarŝo kontraŭ enmigrado

Gunnar GÄLLMO
korespondanto de MONATO en Svedio



Jimmie Åkesson vojaĝis al la turka flanko de la turka-siria landlimo, por tie propagandi inter la rifuĝantoj, ke Svedio ne povas loĝigi ilin.

Ekstremdekstraj kaj fremdulmalamantaj movadoj nun prosperas en pluraj eŭropaj (kaj ne nur eŭropaj) landoj.

Svedio estas plena

En Svedio, la plej granda el tiaj partioj nomas sin Svediaj Demokratoj (svede: *Sverigedemokraterna*) kaj estas unu el la grandaj partioj en la parlamento.

Komence de marto, ĝia partiestro Jimmie Åkesson [okesson] vojaĝis al la turka flanko de la turka-siria landlimo, por tie propagandi inter la rifuĝantoj.

Li disdonis al ili flugfoliojn, en kiuj estis skribite (anglalingve):

*Svedio estas plena.
Ne venu al ni!
Ni ne povas doni al vi pli da mono aŭ loĝigi vin.
Ni petas pardonon pro ĉi tiu mesaĝo.*

*Subskribo:
„La popolo de Svedio,
Svediaj Demokratoj”*



”
Multaj konstatis, ke Åkesson ne havas rajton subskribi „La popolo de Svedio”, kaj oni multe pridiskutis eventualajn jurajn agojn

Ne ĉiuj samopinias

La reago ne estis tute laŭ liaj verŝajnaj deziroj. Ne estas klare, kiom el ricevintoj povis legi la anglan, sed la mesaĝo disvastiĝis ankaŭ rete.

En Svedio estis klare, ke ne ĉiuj samopinias kun li. Estis fondita fejsbuka grupo de malsamopiniantoj kun,

post kelkaj tagoj, 100 000 membroj.

Multaj konstatis, ke Åkesson ne havas rajton subskribi „La popolo de Svedio”, kaj oni multe pridiskutis eventualajn jurajn agojn.

Reago de Turkio

Kiam Åkesson estis elironta el Turkio, li venis al la flughaveno de Istanbul, kie la policistoj venigis lin en apartan ĉambron kaj pri-demandis lin.

Kiam ili finfine permesis al li eniri la aviadilon, ili informis lin, ke ekde nun li havas daŭran enirmalpermeson kaj do ne plu rajtos denove eniri Turkion.

Åkesson estas ankaŭ parlamentano, sed pro ĉi tiu vojaĝo li forestis kelkajn tagojn, kiam la parlamento debatis la aferojn pri enmigraĵoj. ■

JAPANIO



ISIKAWA TAKASI

Longvivado, ĉu beno aŭ sufero?

En la nuna Japanio troviĝas ĉ. 71 000 homoj pli aĝaj ol 100 jarojn, kaj kelkaj emas al eŭtanazio.



ISIKAWA Takasi

korespondanto de MONATO en Japanio

Qin Shihuangdi [ĉjin ŝihŭandi] – kiu iĝis la unua imperiestro de unuigita Ĉinio en 221 a.K. kaj sopiris al senmorta vivo – sendis la klerulon Xu Fu kaj tri mil geknabojn serĉi eliksiron por senfina vivo en la Orienta Maro. Sed la ĉiopova imperiestro mortis 50-jaraĝa.

En la nuna Japanio troviĝas ĉ. 71 000 homoj pli aĝaj ol 100 jarojn. Mia 106-jara patrino Tae estas unu el ili. Ĉu ili ĝuas la trezoron, kiun la antikva ĉina imperiestro ne povis akiri? Tae nun loĝas en maljunulejo en la gubernio Iwate – nord-orienta parto de la ĉefa insulo. Ŝi pasigas la tutan tagon en la lito, farante nenion. Ĝis sia 102a vivojaro ŝi legis ĵurnalojn

kaj librojn, sed jam ŝi ne povas. Kiam mi vizitas ŝin, ŝi rekonas min kaj diras: „Mi

”

„Transloku min en iun hospitalon, kie oni faros al mi eŭtanazion”

tro longe vivas. Jam sufiĉas. Mi volas iri al la alia mondo. Transloku min en iun hospitalon, kie oni faros al mi eŭtanazion”.

En Japanio, eŭtanazio ne estas permesata, kaj se mi estus en ŝia situacio, mi elektus ĉesi manĝi kaj baldaŭ mi mortus trankvile kaj sendolore. Tamen, mia patrino erare sed firme kredas, ke se ŝi mortus pro manĝorifuzo, la registaro poste monpunus ŝian post-

lasitan familion per tri milionoj da enoj.

En dezerta kamparo

Ĉirkaŭ 30 km for de la loĝloko de mia patrino estas la urbo Toono, konata pro valoraj kaj interesaj folkloraj rakontoj kaj moroj. Ĝis antaŭ ĉ. 200 jaroj la lokaj vilaĝanoj devis transloki siajn gepatrojn – pli ol 60-jarajn – al dezerta kampo nomata *dendera-no*. Tie, la maljunuloj starigis kabanonj el

herbaĵoj kaj mem kulturis kaj rikoltis sian nutraĵon. Tiaj folkloroj kaj moroj de „maljunulforlasado” troviĝas multloke en la tuta lando, ĉar en malmodernaj vilaĝoj oni ne povis teni kaj nutri maljunulojn, kiuj jam ne povis labori. Hodiaŭ, pro la progreso de la medicino kaj la vivkondiĉoj, multaj homoj vivas pli longe kompare kun tiuj de la malmodernaj epokoj. Longvivado, tamen, ne ĉiam kunportas benon kaj feliĉon.

Statistiko

Laŭ la ministrejo pri sano, laboro kaj bonfarto, la averaĝa vivdaŭro de japanaj virinoj en 2018 estis 87,32 jaroj (la due plej longa en la mondo, post Honkongo kun 87,56) kaj viroj 81,25 (trie, post Honkongo kun 82,17 kaj Svislando kun 81,4). Sed ankaŭ laŭ la ministrejo pri sano la sana vivdaŭro por japanaj virinoj estas 74,21, kaj por viroj 71,19. Sana vivdaŭro estas daŭro, dum kiu oni povas sane vivi sendepende de daŭra medicina aŭ varta helpo. Tio signifas, ke averaĝe vivantaj virinoj devas vivi dum ĉ. 13 jaroj dependante de ia helpo publika aŭ privata, medicina aŭ vivtena – kiel aĉetado, lavado ktp.

Pro la rapida maljuniĝo de la socio, multiĝas la ŝtata ŝarĝo de socia asekuro, kiel elspezo por medicino kaj prizorgado de maljunuloj. Oni scias ankaŭ, ke redukto de la pensioj estas



En dezerta kampo dendera-no, antaŭ 200 jaroj la maljunuloj starigis kabanon el herbaĵoj.

neevitebla. En junio 2019 la vicministrejo pri financo preparis komisionan raporton, laŭ kiu fakuloj antaŭvidis, ke paro de 65-jara edzo kaj 60-jara edzino ĉiunmonate bezonos – se ili vivas ĝis ĉ. 90 jaroj – krom pensio de 210 000 enoj (1739 eŭroj) 50 000 enojn (414 eŭroj). Do, entute mankos por ili 20 milionoj da enoj (165 692 eŭroj), kio necesigos kroman enspezon per laboro aŭ investado.

Tiu novaĵo pri manko de 20 milionoj elvokis grandan disputon kaj koleron, ĉar antaŭe la registaro asertis, ke la pensia sistemo estos stabila kaj sufiĉa dum la venontaj 100 jaroj. Alfrontante tian amasan koleron,

”

Multaj homoj havas maltrankvilon kaj timon pri sia longvivado

Senkompatemo

Antaŭvidante tiujn malfacilaĵojn pri fizikaj problemoj, malsanoj, soleco, timo pri demenco kaj eventuala financa problemo, multaj homoj havas maltrankvilon kaj timon pri sia longvivado. Precipe inter mezaĝaj virinoj multaj pensas, ke longvivado estas risko aŭ sufero. Ekzemple 57 % de la virinoj 50-jaraj ne volas vivi longe, kaj 38 % de la viroj en la sama generacio tiel pensas. Fojfoje aŭdiĝas „infero de longvivado” en iliaj konversacioj. Ili bone scias, ke ilin atendas senkompata socio, kiu postulas memrespondecon kaj memhelpon. ■

Aso Taro – ministro pri financo – rifuzis akcepti tiun raporton, por eviti daŭran kritikan diskutadon en la elektado de senatanoj, unu monaton poste. Kvankam la ministro malakceptis la raporton, jam la konkludo estis sciata, kaj multaj homoj vole-nevole agnoskis la pravecon de la raporto.

SOCIO

Virinoj: kontraŭ militoj kaj torturoj



Françoise **ZAWADI**
Demokratia Respubliko Kongo



**„Ne!” al seksperfortoj kaj
„Jes!” al plukonstruado de
lernejoj por batali kontraŭ
nescio**

Dum longa tempo afrikaj virinoj estis viktimoj de maljusteco. Iliaj edzoj konsideris ilin laboriloj, kiuj devas fari kamparajn laborojn, serĉi kaj produkti nutraĵojn kaj okupiĝi pri multnombraj infanoj. Virinoj, kontraste al iliaj fratoj, ne rajtis eniri lernejojn. Feliĉe jen kaj jen leviĝas voĉoj, kiuj postulas egalecon por ambaŭ seksoj.

La viroj komencas kompreni, ke virinoj povas kontribui al la progreso de la lando. Nun, filinoj rajtas lerni samkiel filoj. Virinoj sidas en oficejoj kaj faras tion, kio antaŭe estis malfacila por virinoj. Ili decidas pri la estonteco de la lando. Finfine oni komprenis, ke „klerigi virinon estas klerigi la tutan socion”, kaj ke la progreso de la lando dependas de la klerig-nivelo de la patrinoj.

Ni, afrikaninoj, multe dankas al Unuiĝintaj Nacioj (UN), kiuj en 1977 deklaris la 8an de marto virina tago.

Tio signifas, ke ni, virinoj, devas nin konsideri egalaj al viroj, kaj la egaleco inkluzivas seksegalecon.

Miskomprenoj inter fratoj

Mi estas patrino vivanta en Norda Kivuo (en Demokratia Respubliko Kongo), kie virinoj daŭre suferas pro militoj. La interetnaj malamoj, la subitaj miskomprenoj inter fratoj – kiuj tamen dum jaroj kune vivis – kondukis al ĉiutagaj bataloj en Kongo, Burundo, Ruando kaj Ugando, situantaj ĉirkaŭ la grandaj lagoj de Afriko.



Françoise Zawadi: „Ne!” al seksperfortoj kaj „Jes!” al plukonstruado de lernejoj por batali kontraŭ nescio.

Ni, virinoj, ne konsentas pri iliaj vidpunktoj [de viroj], ĉar ĝuste ni estas viktimoj

Anstataŭ zorgi pri la bonstato de siaj landoj, anstataŭ pensi pri la estonteco de siaj gefiloj, la viroj perdas tempon pensante, kiel malkunigi tion, kio estas kuna. Ni, virinoj, ne konsentas pri iliaj vidpunktoj, ĉar ĝuste ni estas viktimoj.



Per tiu ĉi teksto ĝia aŭtoro partoprenas en la konkurso „Premio Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento” (vidu en p. 14 de tiu ĉi numero).

Ĉu vi povas imagi, kiom da virinoj oni perfortis ekde la komenco de la milito? La malamiko de ĉiu progreso estas malsekureco.

Virinaj jesoĵoj

Ni, virinoj el evolu-lando, diras „Ne!” al seksperfortoj kaj „Jes!” al plukonstruado de lernejoj por batali kontraŭ nescio. „Jes!” al partopreno en ĉiuj decidoj, kiuj koncernas la estontecon de niaj landoj. ■




KUBO

Konsultlibro por hispanlingvanoj



Ariadna **GARCÍA GUTIÉRREZ**
korespondanto de MONATO en Kubo



JABIEROKUBO

„La lingvo, kiu nin unuigas” estas utila konsultmaterialo pri lingvaj kaj kulturaj aspektoj de la hispana lingvo

Juan Ramón Rodríguez Gómez, elstara lingvisto, historiisto, eldonisto-korektisto kaj fakulo pri hispan-amerika lingvistiko, prezentis sian libron *La lengua que nos une* (La lingvo, kiu nin unuigas) la 16an de decembro 2019.

La libroprezentado okazis ĉe la Supera Popola Tribunalo de Kubo en Havano, kaj dum la paroladoj oni elstarigis ankaŭ la plurjaran agadon de la aŭtoro kiel historiisto de Kuba Esperanto-Asocio.

La libro

Temas pri la tria eldono – pli ampleksa kaj riĉa – de tiu ĉi altkvalita verko, kiu enhavas diversajn artikolojn kaj komentojn publikigitajn de la aŭtoro inter la jaroj 2000 kaj 2018.

De la vidpunkto de du stiloj – jura kaj ĵurnalisma – la libro reliefigas lingvajn kaj kulturajn aspektojn de la hispana lingvo, kio faras ĝin utila konsultmaterialo. Sinteze, konkrete kaj bibliografie la aŭtoro disponigas siajn konojn, verkojn kaj analizojn en rilato kun la flegado kaj vartado de la hispana lingvo.

La aŭtoro

Juan Ramón Rodríguez Gómez laboras de pli ol unu jardeko ĉe la Supera Popola Tribunalo de Havano, kaj tie estiĝis la ideo verki tiun ĉi libron pro ĝia graveco por la komunumo de juristoj en la redaktado kaj kreado de fakaj tekstoj.

Jam de pluraj jaroj li diligente laboras kiel historiisto pri la Esperanto-movado en Kubo. Krome, li riĉigas la renkontiĝojn per prelegoj kaj instruoj pri dokumenta redaktado. ■

TRAFIKO

Rektaj trajnoj inter Vieno kaj Bruselo



Renate kaj Walter KLAG
korespondantoj de MONATO en Vieno



Sen ŝanĝi trajnon oni povas nun dumnokte veturi de Vieno al Bruselo (ĉ. 1100 km) kaj de Verono al Lübeck (ĉ. 1250 km). De la viena ĉefstacidomo oni ekveturas dimanĉe aŭ merkrede je 20:38, kaj alvenas en Bruselo suda stacidomo je 10:55.

La reveturo eblas lunde kaj ĵaŭde. Ekveturo: 18:04; alveno en Vieno: mardo respektive vendrede je 08:27. La prezo por unu sidloko estas 29,90 eŭroj, tien aŭ reen. Ankaŭ la tirola ĉef-

urbo Innsbruck estas nun rekte ligita al Bruselo.

Parlamentanoj testis

Parlamentanoj de Eŭropa Unio veturis per la unua trajno la 19an de januaro de Vieno al Bruselo. Okaze de la veturo al la unua kunsido de la Eŭropa Parlamento en la jaro 2020, ili estis konvinkitaj de la medikonvena kaj komforta vojaĝo dum la nokto.

Iom pli longe daŭras la veturo de Verono en norda Italio tra Aŭstrio kaj Germanio ĝis Lübeck. ■



La aŭstra ministrino interalie pri infrastrukturo, Leonore Gewessler, kaj la ĉefo de la aŭstraj Federaciaj Fervojoj, Andreas Matthä, okaze de enoficiĝa solenaĵo la 7an de januaro 2020.

Pliaj informoj troveblas ĉe www.oebb.at.



Artikolojn pri la vivo en via regiono sendu al moderna_vivo@monato.be.

ANTAŬ 40 JAROJ

Dek monatojn aĝa bebo gajnis juran batalon



Paul PEERAERTS

korespondanto de MONATO en Belgio

Ke infanoj de needziniĝintaj patrinoj en Belgio nun havas la samajn rajtojn kiel tiuj en „normala” familio, tion ili ŝuldas ĉefe al Paula Marckx [marks] el Berchem, antaŭurbo de Antverpeno. En 1979 la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj en Strasburgo konsentis kun ŝi en kverelo kun la belga ŝtato. Aŭ pli ĝuste, ne kun ŝi, sed kun ŝia dek monatojn aĝa filino.



Paula Marckx

En Belgio kaj en multaj aliaj landoj infanoj naskitaj de needziniĝintaj patrinoj havis malmultajn rajtojn. Ili ekzemple ne povis heredi de siaj gepatroj. Frazo el la belga leĝo iĝis fama, ne nur inter studentoj pri juro: *Bâtard ne succède point*, „Bastardo nenion heredas”. La sola eblo por la patrinoj estis adopti sian infanon. Tion eksciis en 1973 la juna Paula Marckx, kiam ŝi donis la vivon al sia filino Alexandra. Jure ŝi ne havis patrinan rilaton kun sia filino, kaj kiam ŝi forpa-

sos, la filino heredos nenion. Tion Paula opiniis tre maljusta, kaj ŝi sendis leteron al la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj en Strasburgo. La Kortumo sufiĉe rapide reagis, sed flegme diris: „Nur persono, al kiu estas kaŭzita maljusto, rajtas apelacii.”

Paula tamen per tiu respondo ne sentis sin venkita, kaj ŝi skribis novan leteron, nome de sia filino. La letero komenciĝis jene: „Mi estas Alexandra Marckx. Mi estas dek monatojn aĝa bebo kaj mi faras plendon kontraŭ Belgio”, kaj ĝi finiĝis per „Mi

”

„Pro la juĝo la belga ŝtato devis fini la diskriminacion inter ‘laŭleĝaj’ kaj ‘eksterleĝaj’ infanoj. De tiam ekstergeedzecaj infanoj ricevis plenan statuson kaj egalajn heredajn rajtojn.”

esperas, ke bebo kiel mi sen rajtoj povas kalkuli je homoj kun sperto kiel vi.” Kvin jarojn poste, la 13an de junio 1979, la Eŭropa Kortumo konsentis kaj la belga ŝtato devis fini la diskriminacion kontraŭ fraŭlaj patrinoj kaj iliaj infanoj.

Mejloŝtono

Laŭ la antverpena profesoro pri familia juro Frederik Swennen la „juĝo Marckx” estas vera mejloŝtono. „Ĝi kaŭzis senprecedencan revolucion en la familia juro”, li diras.

„Pro la juĝo la belga ŝtato devis fini la diskriminacion inter ‘laŭleĝaj’ kaj ‘eksterleĝaj’ infanoj. De tiam ekstergeedzecaĵaj infanoj ricevis plenan statuson kaj egalajn heredajn rajtojn.”

Laŭ Swennen la juĝo kaŭzis ankaŭ, ke la registaro prenis novan sintenon en familiaj aferoj. La juĝo Marckx diras, ke la „rajto je respekto al la privata kaj familia vivo” (artikolo 8 de la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj) implicas favoran devon, ne nur rajton, kio signifas, ke la ŝtato devas aktive protekti tiun rajton. Antaŭ la juĝo la artikolo estis komprenata tiel, kvazaŭ la registaro ne enmiksiĝu en la privatan kaj familian vivon.

Marckx kontraŭ Belgio

40 jarojn poste la „juĝo Marckx”, ankaŭ nomata „juĝo Marckx kontraŭ Belgio”, havis alian neatenditan sekvon. Delphine Boël, brusela artistino, estas ekstergeedzeca filino de la (emerita) reĝo Alberto la 2a. Alberto tion ĉiam neis, ĝis juĝisto opiniis, ke ekzistas sufiĉe da suspektoj, kaj ke la reĝo devas disponigi sian DNA al la kortumo. Tio pruvis, ke efektive Delphine Boël estas ekstergeedzeca filino de reĝo Alberto kaj ke validas ankaŭ por ŝi la „juĝo Marckx”, kaj ke ŝi do estos unu el la heredantoj, kiam la reĝo mortos. Do ne nur Marckx „kontraŭ Belgio”, sed eĉ kontraŭ ĝia reĝo. ■



Premio Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento

Okaze de la 40-jara ekzisto de MONATO, kaj por memori sian forpasintan ĉefredaktoron Paul Gubbins, la revuo starigis la Premion Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento. Ĉiujare, kaj tiel longe ke restos mono en la fonduso kreita por tiu ĉi celo, estos aljuĝataj ĉefpremio de 250 eŭroj, dua kaj tria premioj de 100 eŭroj kaj sep senpagaj abonoj de MONATO. Povas partopreni ĉiu persono, kiu bone regas Esperanton kaj kiu ne verkis por MONATO en la lastaj kvin jaroj.

Por partopreni la kandidatoj sendu tekston de minimume 500 kaj maksimume 2500 vortoj al nova_talento@monato.be La temoj, inter kiuj la kandidatoj povas elekti, estas:

- La politiko, vivo, turismo aŭ historio de sia lando aŭ regiono
- Ekonomio
- Komputado
- Scienco
- Medio kaj ekologio
- Lingvo

La redaktoroj decidis, surbaze de la lingva kaj ĵurnalisma talento de la aŭtoroj, kiuj artikoloj partoprenantaj en la konkurso aperos en MONATO. El tiuj la ĵurio, konsistanta el redaktoroj de MONATO kaj eksteruloj, elektos ĉiujare la dek plej bonajn kaj atribuos al iliaj aŭtoroj la premiojn.



La kompleta regularo de la konkurso aperas en https://www.monato.be/nova_talento.php


”

Kial oni tiam nomis ĝin *sarso* kaj ne „la nova kronviruso”, kiel oni faris nun? Ankaŭ *merso* (MERS-CoV) en 2012, malpli disvastiĝinta viruso, neniam estis nomata „la kronviruso”. Ni suspektis, ke la kialo estas trovebla en Ĉinio, ĉar ja kaj SARS-CoV kaj SARS-CoV-2 (la viruso, kiu kaŭzas la malsanon COVID-19) unuafoje infektis homojn en tiu lando

AKTUALE

Virusa konfuzo

pp



GERD ALTMANN

Pluraj legantoj rimarkis, kaj kelkaj atentigis MONATON pri tio, ke en la amaskomunikiloj, kaj ankaŭ en la sociaj retoj, regas ioma konfuzo pri la nomo de la viruso, kiu ekde decembro hantas la mondon. En la komenco oni parolis ĉefe pri la kronviruso, poste pri la nova kronviruso, kaj ankorau poste multaj sciencistoj uzis nur la nomon de la malsano COVID-19. Eĉ Tedros Adhanom Ghebreyesus, la ĝenerala direktoro de la

Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) intervenis emfazante, ke gravas nomi la novan kronvirusan malsanon COVID-19.

La epiteton *nova* oni ekuzis komence de la jaro, kiam la amaskomunikiloj ekkonsciis, ke ekzistas pluraj kronvirusoj. La ne tiom junaj gelegantoj certe memoras la malsanon *sarso*, kaŭzitan de la kronviruso SARS-CoV, kiu trafis ĉefe Ĉinion komence de la jaro 2003. Kial oni tiam nomis ĝin *sarso* (aŭ *saroso* aŭ *sasoso*, ĉar oni tiam same diskutis

pri la nomo, kiel nun pri *kronviruso* kaj *koronaviruso*!) kaj ne „la nova kronviruso”, kiel oni faris nun? Ankaŭ *merso* (MERS-CoV) en 2012, malpli disvastiĝinta viruso, neniam estis nomata „la kronviruso”. Ni suspektis, ke la kialo estas trovebla en Ĉinio, ĉar ja kaj SARS-CoV kaj SARS-CoV-2 (la viruso, kiu kaŭzas la malsanon COVID-19) unuafoje infektis homojn en tiu lando.

Kaj nia suspekto verŝajne estas prava. Legantino Xiaozhe Liu skribis: „*Sarso* estas akronimo de „Severa

Akuta (Re)spira Sindromo’ (en la ĉina: 严重急性呼吸综合征), kaj *merso* estas akronimo de „Mez-Eosta (Re)spira Sindromo’ (en la ĉina: 中东呼吸综合征), do en ambaŭ mankas la vorto, kronviruso’ (冠状病毒), kaj sekve la ĉinoj nomis ilin sen „kronviruso’. Sed, ĉi-foje, tiun novan malsanon la ĉinoj nomas la „nova kronvirusa pneŭmonio’ (新型冠状病毒肺炎), do ĉi tie ja sin trovas la vorto „kronviruso’, kaj pro tio ĝi komencis esti uzata inter ĉinoj kaj poste en la tuta mondo.” ■

Koncerne min kaj mian edzinon, ni estas anoj de unu el la plej malnovaj kaj eksmodaj el tiuj rondoj, nome la Gramofona Societo de Tulamoro.

OPINIO

Ĉu lingvo influas la melodion de kantoj?



JALAL GERALD ARO/ PHONO GALERIE.COM



Garbhan **MACAOIDH**
Irlando

La Origino de Specioj

Karolo Darvino



Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Kvankam la vivosciencaj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono,

La *Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen.
www.retbutiko.be
retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko (papera versio), 14,40 € (ePub, Mobi, PDF)

Kvankam nia urbo estas nek granda nek kulture fama, en ĝi troviĝas sufiĉe granda sortimento de societoj, kluboj kaj asocioj. Laŭ la gusto kaj la aĝo de ĉiu individuo, oni povas elekti esti ano de sportteamo, religia fratularo, ĥoro, amatora teatro, politika partio, fremdlingva rondo, ligo de profesiaj kaj komercistaj virinoj, abstinuloj, junaj patrinoj, vidvinoj, eksinstruistoj, sakŝalmistoj kaj pentristoj; aŭ membro de klubo de junuloj, maljunuloj, naturamantoj, biertrinkantoj, aspirantaj romanistoj kaj poetoj. Do ĉe ni oni ne povas senti sin soleca aŭ suferi pro enuo.

Gramofono

Koncerne min kaj mian edzinon, ni estas anoj de unu el la plej malnovaj kaj eksmodaj el tiuj rondoj, nome la Gramofona Societo de Tulamoro. Mi ne scias precize, kial mi aliĝis al ĝi (dum mia edzino estis jam membro delonge), ĉar unuavide tiu societo povas aspekti sencela kaj teda en la nuna epoko de televido kaj elektronikaj amuzajoj. Fakte ĝi datumas de la tempo, en kiu, en la tiama malriĉa Irlando, la apero de la „gra-

mofono” (termino, kiun la junaj generacioj ne konas aŭ komprenas) estis mirinda novaĵo. En tiu fora epoko, nemultaj posedis tiun inventaĵon. Se, en via vilaĝo aŭ urbeto, iu loĝanto estis sufiĉe riĉa por havigi al si gramofonon, preskaŭ la tuta loĝantaro (aŭ almenaŭ grupo da privilegiaj invititoj) kuniĝadis en la hejmo de la bonŝanculo, por admiri la voĉon de la renoma tenoro Johano McCormack aŭ de alia populara irlanda artisto kantanta pri sia kara maljuna patrino en la fora hejmlando (ĉar plej popularaj estis la kantoj pri irlandaj elmigrintoj) aŭ pri la ĉarma *cailín* (knabino) renkontata en la horto, kie kreskas la terpomoj (tiu lasta ankoraŭ furoras.)

Dinosaŭroj

Ne tiom naiva (aŭ ne ĉiam) estas la etoso en nia gramofona societo. La anoj kuniĝas ĉiun duan semajnon en loka hotelo, kaj unu el ni prezentas preparitan programon de siaj ŝatataj muzikaj registraĵoj (ne-ofte ludataj per antikvaj gramofondiskoj; kutime oni uzas la plej modernajn elektronikajn sonsistemojn). Kompreneble, la disk-recitaloj de la societo ne allogas multajn junulojn. Nuntempe du junaj virinoj kelkfoje ĉeestas, sed la plimulto de la ĉeestantoj estas, kiel

ni, homaj dinosaŭroj kaj kadukuloj. Kaj eĉ ni, fidelaj membroj, ofte trovas la recitalojn iomete tedaj kaj tro longaj.

Akcentado

Antaŭ nelonge, dum la ludado de iuj belaj muzikaĵoj (de Pergolesi, Brahms kaj Bach), venis al mi en la kapon, ke la ritmo kaj la strukturo de kanto plej ofte estas determinataj ne de la melodia sento de la komponisto, sed de la *lingvo*, en kiu ĝia teksto estas verkita. Gravaj influoj al la kanto inkluzivas la normalan akcentadon de la vortoj: ĉu sur la unua (ekzemple en la ĝermanaj idiomoj), ĉu sur la antaŭlasta (kiel en la pola kaj en Esperanto), ĉu sur la lasta silabo (kiel en la franca kaj la gvarania, indiĝena lingvo de Paragvajo) aŭ kun egala akcentado, kiel en la japana. Kelkaj lingvoj ŝajnas esti nature kreitaj por kanto, precipe la itala – ankaŭ, kvankam iom malpli dolĉa, la kastilia hispana (kompare kun la latin-amerika). Preskaŭ ĉiu latinida lingvo, kiu posedas klarajn vokalojn, bone sonas, kiam oni kantas en ĝi. Sed la portugala de Portugalio (ne de Brazilo) kaj la hebrea posedas neklarajn vokalojn (temas pri la tiel nomataj *ŝva-vokaloj*: trajto, kiu iom distingas ilin de aliaj mediteraneaj lingvoj). Ĉiuj ŝemidaj lingvoj havas fortajn guturalajn sonojn, kaj iom similaj estas la greka X kaj la hispana J.



”
Ŝajnas, ke la strukturo de la lingvo, en kiu oni kantas, decidas la sonon de la melodio, multe pli ol faras la imago de la komponisto aŭ la poezia sento de la aŭtoro de la kanto-teksto

Alia lingva maloftaĵo estas la sono de la gorĝa *gamma*, kiu aŭdiĝas en malmultaj eŭropaj lingvoj, ekzemple la novgreka (γ) kaj la gaela. Tre malofta sono – la antaŭ-aspiracia H (malforta spiro antaŭ konsonantoj) – aŭdiĝas nur en la islanda kaj la skotgaela. La sono de pola strekita L (Ł) aperas ankaŭ en la gaela lingvo de Skotlando.

Tradukoj

Plia grava influo troviĝas en la formo de la individuaj vortoj de la kanto. La angla lingvo posedas multege da unusilabaj vortoj kaj neklaraj vokaloj. Pro tio

oni povas konstati, ke estas malfacile traduki kontentige anglajn kantojn en, ekzemple, Esperanton kaj en latinidajn lingvojn. Male, kantoj en latinidaj idiomoj ĝenerale tre bone adaptiĝas al Esperanto, kaj inverse. Kutime, kiam oni aŭdas germanajn kantojn, oni rimarkas, ke la melodio eĥas la aŭdeblan dividon inter la individuaj vortoj (la tiel nomata *gehackt-pronconco*¹), kiu ne estas tiom rimarkebla ĉe aliaj ĝermanaj lingvoj, ekzemple la skandinavaj. Bedaŭrinde, tradukitaj versioj de italaj operoj ĝenerale sonas teruraj, precipe en la angla lingvo.

Reagoj

Resume ŝajnas, ke la strukturo de la lingvo, en kiu oni kantas, decidas la sonon de la melodio, multe pli ol faras la imago de la komponisto aŭ la poezia sento de la aŭtoro de la kantoteksto. Almenaŭ tio estas la hipotezo de ĉi tiu eseisto. Tamen, tre bonvenaj estus reagoj de la legantoj! Espereble, iuloke, aspiranta muzikologo pretus verki akademian tezon pri la rilato inter lingvo kaj melodio. ■

1. Disigita, dishakita, stakata pronconco. (red.)

ZOOLOGIO

En la visceroj de ĝis nun nekonata krustulo, sciencistoj trovis mikroplastan fibron kaj pro tio baptis la besteton *Eurythenes plasticus*, Plasta eŭriteno.



Krustulo malkovrita (p)lastatempe



Julius HAUSER
korespondanto de MONATO en Slovakio

Grupo de sciencistoj el la universitato de Newcastle [nĵúkasal] (Anglio) malkovris ĝis nun nekonatan specion de krustulo. Ĝi nomiĝas *Eurythenes plasticus* kaj estis priskribita en la ĉi-marta kajero de la scienca gazeto *Zootaxa*.

Mariana Fosego

Ĉi tiu nova specio de krustulo estas nur 5 centimetrojn longa, kaj oni ĝin malkovris en la Mariana Fosego, inter Japanio kaj Filipinoj, je profundo de pli ol 6900 metroj.

La scienca nomo *Eurythenes plasticus* atentigas precipe pri la problemaro de plastaj forĵetaĵoj en la naturo. En la visceroj de unu el la krustuloj, sciencistoj trovis mikroplastan fibron, kiu estas je 83,74 % identa kun polie-

tilena tereftalato (PET), tio estas termoplastaĵo el la familio de poliesteroj. Ĝi estas uzata ankaŭ por la produktado de plastaj boteloj, teleroj, kuireja vazaro, teksaj fibroj ktp.

Senrespondeca konduto

Mikroplastaĵoj penetras en la profundon de oceanoj diversmaniere. Ĉar la kvanto de plastaj forĵetaĵoj, kiuj atingas profundajn par-

”

En la plej profundaj partoj de oceano, vivas animaloj kies korpoj jam enhavas plastojn antaŭ ol ni ekkonas ilin

tojn de oceanoj, pligrandiĝas, laŭ la scienca studo kreskas ankaŭ la probablo, ke marbestoj povas pli ofte konsumi mikroplastaĵojn.

Eurythenes plasticus montras al ni, kiom grandaj estas la sekvoj de nia senrespondeca konduto, precipe rilate al la prilaborado de plastaj forĵetaĵoj. En la plej foraj partoj de nia planedo, en la plej profundaj partoj de oceano, vivas diversaj animaloj, kies korpoj jam enhavas plastojn antaŭ ol ni ekkonas ilin. ■

PANDEMIO

Kronviro distopio



Xavi ALCALDE
korespondanto de MONATO en Barcelono

Famiĝis rakonteto de la hispana filmreĝisoro David Trueba, kiu celis konsciigi pri la avara kaj sensenca eŭropa politiko rilate al rifuĝintoj.

magu, ke la kronviro-sa malsano COVID-19 daŭre disvastiĝos en Eŭropo senbride, dum sur la afrika kontinento, pro la klimataj kondiĉoj, ĝi havos neniun efikon. Teruritaj, eŭropaj familioj fuĝus historie de la malsano survoje al Afriko. Ili klopodus transiri la maron de la hispana marbordo aŭ enirus amase en malfortikajn ŝipetojn el la grekaj insuloj kaj la turka marbordo. Per-

sekutataj de nova mortiga plago, ili provus atingi sekurecon, urĝate de nekonata vivbezono.

Tamen, atinginte la afrikan marbordon, ili renkontus la samajn barilojn, la samajn perfortajn kontrolojn kaj nesturmeblajn landlimojn, kiujn la eŭropanoj starigis, kaj renversigis ilia haltiga potenco. Aldone, la nord-afrikaj polic- kaj milit-fortoj ordon- nus pafi la okcidentanojn

”

Atinginte la afrikan marbordon, ili renkontus la samajn barilojn, la samajn perfortajn kontrolojn kaj nesturmeblajn landlimojn, kiujn la eŭropanoj starigis

senkompte. Ili krius al ili: iru hejmen, lasu nin solaj, ni ne volas vian malsanon, vian mizeron, viajn bezonojn. Gvidate de priarabis- maj mafioj, iuj eŭropanoj fine sukcesus atingi afrikajn cellokojn. Nun ja estos iom da empatio kaj solidar- eco, ili pensas. Kontraŭe, kun ekstrema krueleco, oni enŝlosus ilin en negastamaj kvarantenoj, kie ili estus sen- igitaj de siaj havaĵoj, siaj sentoj, sia digno.

Maljusteco

Tiun rakonteton verkis la hispana filmreĝisoro David Trueba en la gazeto *El País* la pasintan 10an de marto 2020. Li celis konsciigi pri la avara kaj sensenca eŭropa politiko rilate al rifuĝintoj. La teksto disvastigis kiel viruso per sociaj retejoj, kaj oni republikiĝis ĝin multloke. Temas pri distopio¹, kiu kompreneble ne okazos. Fakte plej verŝajne estos la plej malriĉaj kaj vundeblaj landoj, kiuj plej suferos en la nuna krizo. Kiel kutime. Kiel ĉiam. Ĉar ne eblas, ke iam aperos plago, kiu efikas nur al riĉaj landoj, ĉu ne? Aŭ ĉu eble jes?

Tiu distopia rakonto havas, miaopinie, grandan elvokan povon. Per malmultaj vortoj ĝi montras la maljustecon de la situacio, kiun miloj da homoj alfrontas simple pro tio, ke ili naskiĝis

1. Distopio: malbona, malfeliĉa utopio.

”

Pli longatempe neniuj scias, kiel tiu ĉi viruso ŝanĝos la mondon. Eblas, ke la registaroj de ĉiuj landoj fine komprenos, ke ni ĉiuj estas tiom interkonektitaj, ke ni ne plu povas ignori la problemojn okazantajn en aliaj landoj, ĉu epidemion, klimatsanĝigon, militon aŭ ion ajn alian

en aparta lando. Eble pro tio ĝi fariĝis tiom sukcesa. Aliflanke, pro la necerteco pri la evoluo de la pandemio, niaj socioj jam panikas. Verdire, neniuj scias, kio

okazos estontece. Iam (es-pereble baldaŭ) troviĝos vakcino, kaj tiam oni reprenos pli-malpli normalan vivon. Sed pli longatempe neniuj scias, kiel tiu ĉi viruso ŝanĝos la mondon. Eblas, ke la registaroj de ĉiuj landoj fine komprenos, ke ni ĉiuj estas tiom interkonektitaj, ke ni ne plu povas ignori la problemojn okazantajn en aliaj landoj, ĉu epidemion, klimatsanĝigon, militon aŭ ion ajn alian. Temas pri internaciaj aferoj, kiuj nepre bezonas internaciajn kundecidojn. Sed ankaŭ eblas, ke homoj kaj registaroj fariĝos eĉ pli obsedataj pri la danĝeroj, kiujn ilia opinie alilandanoj kunportas. Sekve, oni pensos ĉiam pli naciskale kaj fermos ĉiam pli la naciajn landlimojn, kvazaŭ tio estus ia mirakla solvo por ĉiuj ajn minaco.

Junecaj pensoj

Studentino mia argumentis lastatempe, ke tiu ĉi pandemio povus esti ŝanco

por ĉion rekomenci: fizike, medie, ekonomie. Kiel ekzemplon, ŝi menciis la fakton, ke delfenoj aperis denove en la veneciaj kanaloj. Ne hazarde temas pri juna homo, ĉar ankaŭ pri tiu ĉi temo la generacia divido influas nian pensmanieron. Indas do, ke ni revenu al la idealismaj pensoj de nia juneco – ni daŭre bezonas ilin.

Dependas de ni mem, ĉu tiu ĉi krizo utilos al la popoloj por apliki la ŝokdoktrinon de Naomi Klein (tio estas, ili profitos de la tutmonda paniko por efektiviigi pliajn novliberalismajn soci-ekonomiajn reformojn, kiuj plie limigos niajn liberecojn kaj interhelpajn komunumojn), aŭ ĉu ni sukcesos ekkrei pli solidaraĵajn kaj kunlaboremajn rilatojn inter la homoj kaj inter la landoj. En tiu dua okazo, se temas pri solidareco kaj kunlaboremo, eble nia kara lingvo kaj ties valoroj ankoraŭ havas ion por diri. ■

40 jaroj de MONATO konsultebaj!

Ekde nun ĉiuj numeroj de Monato, de la unua ĝis la lasta, troviĝas en la dosierformo PDF en nia retejo. Vi povas trovi ilin en

<https://www.monato.be/indekso.php>

La unuaj 22 jaroj estis sizife skanataj de Roland Rotsaert (kio kostis al li nenombreblajn horojn) kaj poste Ivan Garcia zorgis pri la optika rekonigo. Tre tre koran dankon al ili pro la laboro!



EKOLOGIA POLITIKO

Kie restas la verduloj?



Roland **RO TSAERT**
korespondanto de MONATO en Belgio

La aŭtoro esprimas frustriĝon pro la troa atento pri la klimatsanĝiĝo, kiu nuntempe ŝajnas esti la kaŭzo de preskaŭ ĉiuj problemoj de nia planedo.

Kun granda intereso mi legis la artikolon de Edward Kusters en la decembra numero (p. 17-19), kvankam mi ne ĉion bone komprenis (sed ankaŭ la reagan artikolon de Werner Fuß en la februara numero (p.18-20) mi ne tute komprenis). Mi ja sentas la saman frustriĝon pro la troa atento pri la klimatsanĝiĝo, kiu nuntempe ŝajnas esti la kaŭzo de preskaŭ ĉiuj problemoj de nia planedo. Ĉe mi tio estas, ĉar, rilate al klimato kaj



Estus logike serĉi fidindajn informojn ĉe la verdulaj politikaj partioj, sed ankaŭ tie mi ne sukcesas

naturmedio, mi trovas nur informojn nekompletajn kaj kontraŭdirajn.

Kiel oni mezuras?

Oni nun ĝenerale asertas, ke por mezlongaj vojaĝoj (1000 ĝis 2000 km) fervojo estas preferinda al aviadilo aŭ privata aŭtomobilo, sed kie estas detalaj kaj aktualaj kalkuloj pri tio? Por la du lastaj mi mem kapablas proksimume kalkuli la bezonatan kvanton da brulaĵoj por iu vojaĝo kaj sekve la konsumon je pasaĝerkilometro. Pri CO₂, polvo

kaj aliaj poluaĵoj mi ne povas juĝi. Por fervojo la energifonto plejofte estas elektro. Kiom da elektro konsumas la kutimaj kaj la rapidegaj trajnoj? Kia estas la rilato inter konsumo kaj rapideco? Kiel la elektro estas produktita? Kiu transportilo estas preferinda, se oni pesas ĉiujn faktorojn: konsumon de nerenovigeblaj resursoj, poluon, sekurecon, tempouzon kaj aliajn? Certe multloke sciencistoj jam faris tiajn kalkulojn, kun variaj rezultoj, sed mi ne sukcesas trovi ilin.

Kie estas la verduloj?

Estus logike serĉi fid-indajn informojn ĉe la verdulaj politikaj partioj, sed ankaŭ tie mi ne sukcesas. Mi ja konas la verdulan partion de mia regiono ekde la komenco, kiam ĝi vere havis (malgrandan, sed fidelan) sekvantaron. Bedaŭrinde la tiamaj gvidantoj ofte ne sciis kiel kunlabori kun la ruzaj kolegoj de la aliaj partioj, kaj se verdulo akiris registaran funkcion, li ofte malsukcesis. Nun la verduloj „profesiigis” kaj apenaŭ diferencas de la tradiciaj partioj. La fidela bazo grandparte perdiĝis kaj depende de la hazardo post balotado fojfoje estas bona, fojfoje malbona rezulto.

Iam elektra energio estis abomenata de la verduloj (pro la nur tridekprocenta rendimento ĉe produktado, pro la nuklea origino ...). Ironie, elektro nun iĝas la bazo de nia energisistemo, kaj pro la origino (fotovoltaiko, ventoturbinoj ...), kaj pro la aplikoj (elektraj veturiloj, varmopumpiloj ...). Sekve de tio urĝas konstrui pli da produktiloj kaj restrikturi kaj plifortigi la distriburetojn.

Kio okazas, se estas bezono konstrui pliajn ventoturbinojn aŭ novan alt-tensian reton? Eĉ se estas zorge elektita loko, kiu alportas laŭeble malmultan aldonan ĝenon, ekzemple en kamparo rande de granda aŭtovojo, tuj venas protestoj el ĉiuj flankoj: de

”

Kio okazas, se estas bezono konstrui pliajn ventoturbinojn aŭ novan alt-tensian reton? [...] Kion faras la verduloj? Se ili ne kunprotestas, ili silentas

la loĝantoj, de la birdoprotektantoj, de la ŝatantoj de la bela kamparo ... Kion faras la verduloj? Se ili ne kunprotestas, ili silentas. Laŭ mi, serioza politikisto interveni kaj klopodu konvinki la koncernatojn, ke la propono estas la plej taŭga. Kio finfine okazas? Oni konstruas turbinojn je multe pli alta kosto for sur la maro, kie ili ne videblas. La konstruado de la alt-tensia lineo oni poreterne prokrastas kaj tiel malebligas racian distribuon de energio, aŭ oni kaŝas ĝin subtere, denove je multe pli granda kosto, ne nur de mono, sed ankaŭ de resursoj.

Ĉu mi kredu la gazetaron?

Kutime en la semajnfina eldono de niaj gazetoj aperas „testo” de iu nova tipo de aŭto. Kiam mi estis juna, antaŭ duona jarcento, estis vere detalaj testoj, unu- aŭ eĉ du-paĝaj. Nun restas

nur duona kolumno kun informoj, kiuj por mi tute ne utilas: ke la aŭto atingas rapidecon de 100 km/h en dek sekundoj kaj ke la maksimuma rapideco estas 180 km/h. Pli interesas min la informoj pri poluo kaj konsumo de brulaĵo (laŭ la nova WLTP-normo¹). La CO₂-ciferon mi devas simple akcepti. Pri konsumo mi

mem havas iom da sperto, kaj la menciitaj ciferoj ŝajnas al mi same malfidindaj (tro optimismaj) kiel antaŭe. Estus interese koni la konsumon kiun la testanto konstatis dum la testo, sed tion mi neniam povas legi. (Verŝajne neniam okazas iu testo, ĉar la gazeto simple kopias tekston senditan de la aŭtofabriko.)

Nu, finfine ne vere gravas. Multe pli ol klimatsanĝigon mi timas fatalan kolapson de la monda financa sistemo kaj trian mondmiliton. ■

1. WLTP-normo, mallongigo de la angla *Worldwide Harmonised Light Vehicle Test Procedure*, norma proceduro por testi la poluadon de aŭtoj.

ANTAŬ 40 JAROJ

ETA kontraŭ drogoj?

El MONATO 1980/06, p. 5:

La milita branĉo de ETA (vaska terorista grupo en Hispanio) ĵus komencis kampanjon ĉesigi perforte ŝakron kaj uzadon de drogoj en la vaska lando. ETA asertas ke ekzistas plano per drogoj korupti la vaskan socion kaj deviigi la junularon de l' revolucia pado.



Tiutempa glumarko petis forigon de policejoj kaj drogvendistoj.

Resonanta kaj labirinta poetino dulingva

Fernando Pita



ESPERANTO.NET

Sekve oni facile komprenas la intereson, kiun Chien de feu/Fajra hundo, poemplibro de Marie-France Conde Rey, vekus en tiu menciita grupo.

Ĉiu esperantisto scias, ke nia literaturo multon ŝuldas al tradukado: ekde niaj unuaj momentoj tradukado de majstroverkoj de nacilingvaj literaturoj reprezentas grandan proporcion de esperantaj legaĵoj. Tio pensigos nin pri la eblo trovi, en Esperanto, se ne abundan, do almenaŭ interesan verkaron pri la arto, aŭ scienco, traduki. Malgraŭ tio, estas iom konstateri, kiom malmulte niaj eminentuloj okupiĝis pri konstruado de iu esperantlingva „Teorio de tradukado”: maloftas ĉe ni ne nur tradukoj de referenc-verkoj pri tiu por ni grava temo, sed ankaŭ mankas verkoj tuŝantaj la

”

**Estas tempo
demandi:**

***Kaj la poemoj,
ĉu ili estas
allogaj, interesaj,
bonaj, aŭ ĉu oni
aĉetu la libron
nur por kunlabori
kun niaj movadaj
eldonejoj?***

temon laŭ strikte esperantlingva vidpunkto.

En la korpuso de „Teorio de tradukado” unu el la hodiaŭ plej valorigitaj temoj estas tiu de „memtradukado”. Tio estas, tradukoj

aŭ (pli ĝuste estus diri) versioj faritaj de la aŭtoro(j) mem. Por lingvisto aŭ tradukisto tiuj verkoj ebligas analizi, kun malofta klareco, la mensajn procezojn kaj de la aŭtoro kaj de legantoj de ties (sama?) verko en malsamaj lingvoj.

Sekve oni facile komprenas la intereson, kiun *Chien de feu/Fajra hundo*, poemplibro de Marie-France Conde Rey, vekus en tiu menciita grupo. Ĉar ŝia libro estas dulingva (france kaj esperante) verkita, ŝiaj poemoj estas per diversaj rimedoj kaj elturniĝoj tradukitaj/adaptitaj/reverkitaj de ŝi mem el unu al alia lingvo; kio signifas, ke origine franclingvaj poemoj estis esperantigitaj, kaj inverse. Tio estas, en si mem, ja mal-

ofta evento en ajna literaturo; tamen ne pro tio malpli interesa fenomeno, kiu, se ĝi estus okazinta en lingvo monde pli disvastiĝinta ol la nia, certe, altirus multe pli da atento.

Tamen estas tempo demandi: *Kaj la poemoj, ĉu ili estas allogaj, interesaj, bonaj, aŭ ĉu oni aĉetu la libron nur por kunlabori kun niaj movadaj eldonejoj?* Responde oni devas dekomence diri, ke la respondo dependos de la vidpunkto alprenita: se oni taksas la poemojn pro ilia enhavo, formo, (bel)soneco ktp, oni certe atingos malsimilajn konkludojn.

Ja la poemoj belsonas en Esperanto kaj en la franca (kvankam mi ne estas franclingvano, mi iomete konas tiun lingvon), kaj oni



”

Kelkfoje la poemoj rilatas unu al la alia, ĉu en klara kaj simpla maniero, ĉu en same klara, sed iom labirinta; ekzemple, per la sama idefluo

perceptas en ili la zorgemon de la aŭtorino rilate al sia memtraduka tasko. Tamen ĉar oni povas kompari, oni devas ja agnoski, ke ne ĉiam ŝi atingis veran ekvilibron inter la du versioj: inter ili estas ioma ŝanceliĝo, kaj kelkaj ideoj, rimoj, frazkonstruoj sonas multe pli bone en unu ol en la alia lingvo.

La versformo de la poemoj estas tre interesa, ĉar Conde Rey bonege regas


tiun arton: sonetoj, kvarversoj, liberversoj, ĉiuj oftaj strukturoj de la poezio estas en ŝia verko bone reprezentataj. Kaj estas interese analizi, ke kelkfoje ŝi uzas diversajn formojn laŭ la lingvo de la versio. Tio estas, ŝi bone scipovas adapti sian verkon al la postuloj de ĉiu el la lingvoj, en kiuj ŝi poeziumas.

La libro dividiĝas en kvin partojn, kies centraj temoj estas ja malsimilaj kaj en kiuj estas malsimilaj kvantoj da poemoj, kaj jen ni alvenas al la plej diskutveka punkto en la tuta libro: la ĉeesto de kelkaj ideoj. Kiam oni legas la

poemojn, oni en diversaj poemoj rekonas ideojn, esprimojn, frazerajn, kiujn oni jam aŭdis aŭ legis aliloke. Neniel temas pri plagiato, mi certas pri tio. Sed estas ofta afero, ke poetoj „purigas” siajn mensojn, metante surpaperen multon el tio, kio al ili kaŭzis iun impreson. Tiu procedo, simila al vakuigo de „mensaj tirkestoj”, estas multe pli ofta, ol ni pensas, ĉar ĝi estas mem parto de la maturiĝa procezo de la verkisto, kiu ne ĉiam konscias mem pri tio. Kaj certe, ĉar la poemoj estis verkitaj en diversaj momentoj, sed eldonitaj kune en sama volumo, tiu

fakto montriĝas pli klare ol en verkoj kun pli strikta tempolimo inter verkado kaj publikigo.

Oni tamen ne pensu, ke tio estas kritiko aŭ malplivalorigo de la poemoj. Unue, ĉar, kvankam absoluta noveco estas alstrebinda celo, la okcidenta literaturo delonge konstruiĝas sur referencado al aliaj verkoj, tiel ekde la tempo de Homero tio ne plu estas problemo, ĉar estas neeble esti centprocente nova en tiu kampo. Due, ĉar tio donas al la versoj de Conde Rey certan intimecan tonon, kiu igas, ke oni rekonu, tie kaj tie, ombrojn de aliaj poetoj,



Marie-France Conde Rey: *Chien de Feu / Fajra hundo*. Eld. Ĉarenta Esperanto, Angoulême, 139 paĝoj, broŝurita. ISBN 978-2-9531308-2-9.

Prezo ĉe FEL: 11,50 eŭroj + afranko.

lirikistoj, muzikistoj ktp. Kaj tio estas komfortiga sento, eĉ pro la fakto, ke tiuj „eĥoj” estas ne nur de franclingvanoj, sed el homoj verkintaj en ĉiuj grandaj literaturoj: estas tie Baudelaire kaj Heredia, Rimbaud kaj Henri Salvador, sed ankaŭ Fernando Pessoa kaj Teresa de Ávila, inter aliaj, kiujn alilingvaj legantoj kapablos trovi.

Ne nur pri referencado oni devas ja paroli: Conde Rey ankaŭ bonege scipovas „kudri” siajn poemojn inter si. Kelkfoje la poemoj rilatas unu al la alia, ĉu en klara kaj simpla maniero, ĉu en same klara, sed iom labirinta; ekzemple, per la sama ideflujo. Krome, tiu labirinteco estas la plej signifa kaj individua trajto de la poemoj de Conde Rey, kies interpretado postulas de ni ne la kapablon elkriptigi enigmojn, sed simple atentan legadon.

Kaj ĝuste por pli bone kaj atente legi, ne devas vi, la legonto, okupiĝi pri la „arĥeologio” de la poemoj mem, ĉar por tio estas jam tedaj recenzistoj kaj lertaj kritikistoj. Prenu vi ĵus preparitan tason da kafo, komforte sidigu kaj legu kaj ĝuu la poemojn de Conde Rey, unue en ilia esperanta versio, poste, se vi ne estas ankoraŭ satigita, vivu la aventuron interpreti ilin ankaŭ en la franca: vi ja ne pentos pri tio. ■

Provo detrui la mitojn

Renato CORSETTI



Ekzistas kelkaj neklarigeblaj faktoj en Esperantujo. Unu el ili estas la ekzisto en franca vilaĝo Courgenard kun nur ĉirkaŭ 500 loĝantoj kaj en Esperantujo (kiu, malgraŭ ĉiuj maloptimismaj kalkuloj, estas iom pli vasta ol tiu vilaĝo) de

klerulo tre klera, kiu laŭ ĉi tiu verko kaj aliaj verkoj liaj trankvile moviĝas inter kelkaj modernaj lingvoj kaj la antikvaj greka kaj hebrea. Tion faras ankaŭ aliaj, sed li ne havas problemojn transskribi ankaŭ la aramean kaj diskuti pri la signifo de antikvaj egiptaj vortoj kaj citi precize

laŭ ĝia alfabeto la etiopan nomon *Makeda* de tiu reĝino de Saba aŭ Ŝeba, kiu vizitis Salomonon. Sed la ekzisto de Cherpillod ne estas mito, ĝi estas realo. Same realaj estas multaj informoj en ĉi tiu libro, kiu ne limiĝas je mitoj kaj mitologioj, sed donas informojn pri religioj kaj ilia

ekesto, kiuj estas historiaj faktoj, ekzemple, mazdaismo.

Justa puno

Mi reliefigas tion nur por diri, ke en ĉi tiu libro la leganto trovas amason da informoj ankaŭ pri religioj malmulte konataj en Okcidento. Ekzemple, ĉu vi volas scii, kiam ekestis la hinda religio ĝainismo kaj kion tiu nomo signifas? Aĉetu ĉi tiun libron. Por doni al vi ideon pri la varia sed abunda enhavo de la libro, mi citas nur unu hazardan paĝon, la paĝon 104. Ĝi komenciĝas per la fino de la artikolo pri la *reviviĝo* de Jesuo, rekta mito laŭ Cherpillod kaj laŭ mi, kaj daŭrigas la traktadon per *reviviĝo de la mortintoj*, kiu okazos en la tago de la lasta juĝo, kiam ĉiuj uzintoj de neologismoj aŭ novaj radikoj en Esperanto ricevus la justan punon, se ankaŭ ĉi tiu lasta juĝo ne estus mito. Poste *Rig-Vedo*, hind-religia himnaro, eble la unua verko en hind-eŭropa lingvo, *riŝio*, kantisto aŭtoro de tiuj himnoj, *Romeo kaj Julieta*, verŝaj-

ne, reale ekzistintaj homoj laŭ Cherpillod, sed tre verŝajne, inventaĵoj de italaj literaturistoj, kiuj laŭgrade transformiĝis al Romeo kaj Julieta en anglaj tradukoj de tiuj italaj verkoj, *Romolo*, la fondinto de Romo, mamnutrita de lupino, *Ronda Tablo (kavaliroj de la)*, la konata rakonto pri la reĝo Arturo, *Roŝ-Haŝano*, juda nova jaro, rozario, kristanaj preĝ-globetoj, *Rubeno kaj Ruta*, judaj rolantoj en la Biblio.


Hazarde en ĉi tiu paĝo ne estas multaj grekaj mitoj, sed mi povas certigi vin, ke la aliaj paĝoj plenas je Apolonoj kaj Atridoj kaj je la amaventuroj de Zeŭso, kiu mem troviĝas inter *Zerubabelo*, princo de Jehuda, kaj *Ziusudro*, la lasta antaŭdiluva reĝo de Sumero.

Vera pasio

Dum la legado min trafis du faktoj. Unue, la biblio-kono de Cherpillod estas grandega. Eble li lernis ĝin parkere en la hebrea kaj daŭre citas al mi nekonatajn nomojn de bibliaj malpli gravaj rolantoj, ekzemple, *Hagajo*, la deka el la dek du mal-

grandaj profetoj. Due, lia vera pasio dum la verkado de ĉi tiu libro estis lia provo detrui la mitojn de nia eŭropa kristana kaj aparte katolika religio. Li, evidente, estas franca ateisto, ĉirkaŭata de francaj katolikoj, sed estas por mi neeble ne konsenti kun li. Mi mem eĉ miras, ke dum jarcentoj niaj prapatroj povis kredi je la fabeloj pri virgulina nasko, renaskiĝo tri tagojn post la morto ktp. Kaj ni ne forgesu, ke multaj ankoraŭ kredas tion ankaŭ en riĉaj landoj kiel Usono, kie miksiĝas komputiloj kaj plej kompleta laŭlitera kredo je la Biblio. Se mi havus senfinan monon, mi disvastigus ĉi tiun libron kaj la librojn de Voltaire al la tuta mondo.


Intertempe, mi komencas pensi, ke, eble, André Cherpillod mem estas mito. Eble, en la realo temas pri 40 francaj kleruloj, unu por ĉiu fako, Biblio, hebrea lingvo, aramea lingvo, greka kulturo, teologio, ktp., kiuj decidis verki kune sub la kaŝnomo Cherpillod, kaj kredigis, ke li estas franca esperantisto, kiu loĝas en tre malgranda vilaĝo kaj mem eldonas siajn verkojn. Kiu ankoraŭ povas kredi je tiaj mitoj? ■



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Lange
Beeldekensstraat 169,
B-2060 Antwerpen,
Belgio.
tlf. + 32 3 234 34 00

rete:
retbutiko@retbutiko.be
skajpe fel-monato
www.retbutiko.be.



André Cherpillod: *Vortaro de la mitoj kaj mitologioj*.
Eld. La Blanchetière, Courgenard, 2019. 126 paĝoj, bindita.

Prezo ĉe FEL: 9 eŭroj plus afranko.

ANONCETOJ

L. L. Zamenhof. La homo kaj lia idearo en liaj propraj vortoj (de G. C. Fighiera). Eldonis: Esperanto-Centro Torino. Nova eseo pri la penso de la kreinto de Esperanto pri religiaj, etnaj, politikaj, etikaj, sociaj kaj esperantistaj demandoj. 40 paĝoj, 39 historiaj piednotoj, bibliografia listo de 115 verkoj pri Zamenhof. Aparte interesa estas la propono de Zamenhof, en 1914, krei Eŭropan Tribunalon kaj Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo. 3,90 €. Mendebila ĉe la Libroservo de UEA kaj aliaj libroservoj.

“**Naturista Vivo**”, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: József Németh, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi jam konas tiun ĉi paĝon el la retejo de Monato? La paĝo https://www.monato.be/index_pop.php donas superrigardon pri tiuj artikoloj el Monato, kiuj estis plej multe konsultitaj interrete en la pasintaj 6 monatoj. Kaptu la okazon por (re)legi ilin!

Retbutiko.be donas al vi multe pli da serĉ-ebloj ol antaŭe. Vi povas tuj serĉi el la adres-trabo de via foliumilo (Firefox, Chrome, Explorer, Safari ktp). Ekzemple tajpinte retbutiko.be/trovu/Steele vi tuj trovos ĉiujn verkojn de Trevor Steele, tajpinte retbutiko.be/trovu/politiko vi trovos ĉiajn verkojn pri politiko, aŭ post-tajpado de retbutiko.be/trovu/internacia vi trovos ĉiujn verkojn kun la vorto „internacia” en la titolo. Elprovu tuj kiel facila tio estas!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo.

Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

www.retbutiko.be

TREVOR STEELE

LA FOTOALBUMO FERMIGAS



La aŭtoro de la unuaj du volumoj de „La fotoalbumo” jam delonge mortis, sed deziris, ke la verko estu daŭrigota. Nun venas la „ferma” volumo pri la historio de familio O’Shea, verkita de homo luktanta kun mortiga malsano.



Trevor Steele: *La fotoalbumo fermigas*. Romano originale verkita en Esperanto. Eldonis Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2019.

Formato: 135 x 205 mm, 77 paĝoj kudre bindita. ISBN: 978-9077-066-59-1.

Prezoj ĉe FEL: 7 eŭroj plus afranko;

bitaj versioj (ePub, PDF, Mobipocket) 5 eŭroj.

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista


4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Gennadij Turkov, Sen Rodin, Russ Williams, Stéphan Brault, Ŝarlerik d’Arroi, Ĵak Le Puil, Lilia Ledon, Julia Sigmond, N. Xil Carvalho, Robert Molimard, Claude Gerlat ktp.

Abono: 27,50 € (ekde 16 en kelkaj landoj) Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp





En Flandraj Kampoj

Neniu poemo el la Unua Mondmilito estas tiel konata kiel 'In Flanders Fields' de la Kanada armeokuracisto John McCrae.

Afliktita de la hororo de la milito li verkis ĝin je la 3a de majo 1915 ĉe sia flegejo inter leper kaj Boezinge.

La bruĝa aŭtoro Herwig Verleyen prilumas en tiu ĉi bone dokumentita eldono la vivrakonton de John McCrae kaj la estiĝohistorion de 'In Flanders Fields'.

Li klarigas kiamaniere la poemo evoluis ĝis mondvasta simbolo de ofero kaj batalo por la paco kaj kiamaniere la papavo (poppy), nomita en la poemo, fariĝis la simbolo de ĉiuj pereintoj.

Finfine la leganto konatiĝas kun tio, kio en Flandrio kaj ankaŭ eksterlande memorigas je John McCrae kaj lia poemo.

Amplekso: 68 paĝoj
Prezo 9,95 eŭroj + afranko
Aŭtoro Herwig Verleyen
Aperis 2015